

Literatura Mondo, 5-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 464, 1972.08.30 & 09.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni rigardas al la revuo *Literatura Mondo*, kiu naskiĝis antaŭ kvindek jaroj kaj tiom influis la esperantan kulturon.

A.- Tralegante la prozajn tekstojn de *Literatura Mondo*, tio ĉefe por la unua periodo 1922-1926, oni rimarkas mankojn, kiuj parte ankoraŭ karakterizas la hodiaŭan esperantan literaturon. Pro tio valoras diri kelkajn vortojn pri tiuj mankoj.

Cl.- En la tradukitaj prozaĵoj forestas verkoj de konataj samtempaj aŭtoroj, dum abundas sensignifaj tekstoj.

A.- Se oni legas la novelojn, kiujn aperigis *Literatura Mondo* en la celo serĉi tekstojn hodiaŭ republikigeblajn, oni estas devigata konstati, ke ili bedaŭrinde ne abundas.

Cl.- Abundas popolaj rakontoj, kies realismo estas infaneca ; svarmas pseŭdoromantikaj priskriboj, kies mizero vekas ploron prefere al ribelo ; fabeloj aŭ alegoriaj tekstoj ne maloftas. Konklude ni ne havas la impreson legi revuon, kiu estis eldonita inter la du Mondmilitoj.

A.- La originalaj tekstoj estas ofte pli aktualaj, pli viglaj, pli realaj.

Cl.- Kial tiu diferenco ? Kial tiu nekapablo publikigi tekstojn de grandaj verkistoj ? Kial la originalaj tekstoj estas pli aktualaj, ol la tradukitaj ?

A.- Venas tuj respondo. Por traduki verkojn de modernaj aŭtoroj oni devas pagi aŭtorrajtojn. Tio sufiĉas por definitive malaperigi tradukaĵojn de nuntempe konataj verkistoj. Restas du traduk-eblecoj ; esperantigi klasikaĵojn kaj esperantigi nuntempajn senvaloraĵojn.

Cl.- Ĉar la tradukantoj estas plej ofte amatoroj, ili timas alfronti klasikaĵojn. Estas malpli danĝere proponi esperantigon de teksto, kiun neniu konas, ol riski prezenti tekston, kiun multaj legontoj jam konas, ĉar ĝi troviĝas en nacilingvaj antologioj.

A.- Kun originalaĵoj ne ekzistas tiuj problemoj. Ili simple respegulas la verkistan nivelon de de la aŭtoro mem.

Cl.- La redaktoro mem de *Literatura Mondo*, Teodoro Schwartz, konsciis, ke la ricevitaj tradukaĵoj ne estis tre kontentigaj. En aprilo 1923 li provis reagi. Aŭdu :

A.- « [Nia] celo estas atingebla, se oni sendas al ni multan materialon, se oni tradukas por ni nur valorajn verkojn, se oni elektas verkojn plej diverstemajn, diverstonajn, divershumorajn. Estas neeble pleni la revuon nur per fabeloj aŭ nur per poemoj en prozo, eĉ se ili estas la plej belaj. Precipe mankas al ni interesaj noveloj kun forta karakterizo kaj frapanta tem-plekto. Ni pensas novelojn laŭ maniero de Maupassant. Same ni volus doni ankaŭ al la rido ĝiajn rajtojn. »

Cl.- Teodoro Schwartz ankoraŭ skribas: « Ion ankoraŭ. Ĉe kelkaj tradukoj, kiujn ni povis kontroli per la originalo, ni trovis tro liberan tradukon, kelkfoje preskaŭ nur la enhavon de la

originala frazo. Laŭ nia opinio oni devas esti plej fidela. Prefere kelkaj naciismoj (kiujn ja ni, kiel alilingvanoj, nepre rimarkos kaj elsarkos) ol – pro timo al ili – tro seka, plata, sengusta, pala, kvazaŭ skiza traduko. » (Fino de la citaĵo.)

A.- Oni ne povus pli bone resumi la mankojn de la prozaj tradukaĵoj aperintaj en la unuaj jaroj de *Literatura Mondo*. Verŝajne la lingvo-nivelo de la tradukintoj ne permesis la alfrontadon de kompleksaj stilaj malfacilaĵoj.

Cl.- Tralegante la poeziajn tekstojn de *Literatura Mondo* oni ricevas tute alian impreson. Preskaŭ ĉiuj tradukaĵoj estus nun ankoraŭ uzeblaj okaze de organizo de festivalo. Kaj la originalaĵoj estas tute certe pli altnivelaj, ol la prozaj originalaĵoj.

A.- Kiel klarigi tiun diferencon inter la niveloj de la poeziaj kaj prozaj verkoj ?

Cl.- Kuraĝis alfronti la tradukadon de poeziaĵoj nur sufiĉe kulturitaj kaj lertaj esperantistoj. Kaj la tradukaĵoj kaj originalaĵoj de Kalocsay, kiuj abundas ekde la unua numero de *Literatura Mondo*, tuj malkuraĝigis amatorojn sendi proprajn poemojn.

A.- Nur post la kvinjara krizo de 1926-1931 la revuo *Literatura Mondo* atingos similan nivelon rilate al la prozaĵoj. Verŝajne estis necese havi provtempon. Estis ankaŭ iom post iom eble eviti akcepti tekstojn senditajn de fuŝtradukistoj.

Cl.- Ĉio tio montras la kompleksecon de la eldono de literatura revuo. La krizo de 1926 ne estas nur financa. Se ne kreskis, aŭ eĉ malkreskis la nombro de la abonoj, unu el la kaŭzoj de tiu stagnado estis la malaktualeco de la prozaj tekstoj.

A.- Ankoraŭ nun nia literaturo suferas de la samaj mankoj. Bedaŭrinde ne aperas plu revuo kiel *Literatura Mondo*. Sed se ni rigardas al la libroj, kiuj estas nun aĉeteblaj, ni rimarkas, ke mankas aktualaĵoj. Kulpas la aŭtor-raĵoj. Kaj en la tradukaĵoj svarmas la senvaloraj libretoj. Koncerne la originalaĵojn la stila nivelo estas ege varia. Sed ne tre abundas la ĉefverkoj.

Cl.- La revuo *Literatura Mondo* ludis unikan rolon en la historio de nia movado. Ĝi estis stillernejo. Monaton post monato ĝi donis al verkistoj eblecon publikigi proprajn tradukaĵojn kaj originalaĵojn. Iom post iom ili povis lertiĝi. Bedaŭrinde nuntempe absolute mankas simila lernejo, kaj tio malhelpas harmonian disvolviĝon de nia literaturo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !